

ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux



Prezidanto : Joël LAJUS
1 Les Places
33910 SABLONS DE GUITRES
Tel : 05 57 69 26 96
Mail : lajus.joel@wanadoo.fr

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr



JANVIER 2011

N° 126

La « Espéranto-Gironde » Informilo



al vi ĉiuj por la jaro 2011

VARMA ZAMENHOF-TAGO EN MONTENDRE

LA 19a DE DECEMBRO 2010



ZAMENHOF-TAGO en MONTENDRE

Ĉu neĝo ? Ĉu pluvo ? Tute ne ! Nur frosto kun radia suno kiu brilas dum la tuta tago en tiu dimanĉo la 19a de decembro.

Kiel kutime, ni estis bone kaj varme akceptitaj de la MEG (Montendre Esperanto-grupo) kiu festis sian 15an datrevenon.

Ĉeestis trideko da amikoj, ĉarentiaj kaj ĝirondiaj. En la granda salono tuj saltis al niaj okuloj ekspozici-paneloj, entute dekdu, pri la historio de la movado. Tiuj paneloj, agrable koloritaj, agrable legeblaj, estis pruntedonitaj de Pierre Jagueneau kaj ellaboritaj de la Esperanto-Kulturcentro de la urbo Angers.

Ĉiu laŭ-vice prezentis sin por plibone konatiĝi. Christiane kaj Michel surprizis nin legante fabelon de verkisto La Fontaine en du lingvoj : esperanta kaj ... ĉarentia ! Ili estis ege aplaŭditaj.

Sentis mi ke vekiĝas sovaĝa instinkto. “Klak, klak” plurfoje ripetitaj.

- Diru, Matuzet, kie ci rikoltis tiujn iksodojn ?

Li ŝajnis apreci kaj tre bele ronronis. Kia dankema rigardo!

- La parazitoj ne plu suĉos cian sangon. Por akriĝi ciajn ungojn nenio valoras la trunkon de acero ! Kuri en la ĝardeno, ekkuŝi sur freŝnaskitaj fazeoloj, ja plena ĝuado en la kato vivo.

Minetz filino ne povis alkiutimiĝi al tiu vigla entrudiĝemulo.

Kelkaj “fut-fut” ne tre efikis. Mi ne povis min deteni de admiro antaŭ Ŝaru, kiam li malrapide spiradis.

- Nun ci sentas sin hejme ĉi-tie. Laŭ cia gusto.

Amikino estis trafita per la dentoj de Ŝaru. Ŝi ricevis sufiĉe akran doloron ĉe la suro. Ŝi ŝatas la katojn, ŝi ne komprenis kial ŝi estis atakita.

- Ĉu ci kredas, Matuzet, allogi min per tiuj mordetoj ?

Komprenu kiu volas, la morgaŭan tagon Ŝaru ne plu estis videbla. Honto, rimorso ? Mi ne karesis lin tiuvespere kaj siblis : « **maldankema kato !** » Do, bonan nokton.

Post du tagoj ni ĝuis freŝan vesperon, ĉirkaŭite de petunioj kiam aŭdiĝis aparta miaŭo. El kiu flanko ?

-Laŭ mia opinio mi vetas, ke mia vampiro estas tute proksima, laŭtvoĉe diris amikino. Mi alvokis :

- Matuzet, ĉu ci ?

Nova miaŭo, kaj sur la trotuaro lumigata, ne rapide paŝis Ŝaru. Li ne kuraĝis retrovi min pli proksime kaj sidiĝis. Li tute ne malsatis, kaj ni tre bone aŭdis zumadon apud ni. Do, bonan nokton.

Pludaŭris nia kutima vivo kun ĉiutaga ceremoniaro rilate al Ŝaru. Li pli kaj pli instaligis niahejme. Li tre ŝatis fotelojn kaj ne cedis al la du Minetz la kusenojn sur la seĝoj. Lia apetito kreskis, ankaŭ liaj muskoloj. Kiam li suprensaltis sur la acerojn oni nepre admiris lian flekseblecon ! De tempo al tempo mi, feliĉa, murmuris al li :

- Ci bonfartas en agrabla etoso, ĉu ne ?


Kelkafoje la du Minetz grumblis pro ia ĵaluzo. La vivo tro belis.

Sekvota ...

Sabine

Bele sunis kiam Ŝaru haltis ĉe ni.

La oranĝkolora felo havis cirklaĵajn desegnojn, kiuj pensigis min pri “*Père Ubu*”. Li miaŭis, salutante min sur trotuaro kaj rapide kankre paŝis ; ankaŭ mi provis miaŭi. Mia voĉo ne tro timigis lin, kaj lia pliŝata rigardo ŝajnis peti ion de mi. La ideoj interplektiĝis (*pensis mi*) : “Ĉu arbara kato ? Ĉu oni perdis lin ?” Tiu “*matou*” tamen aspektis sana, sufiĉe “ronda”, la felo brilis en la suno.



- Ha, Matuzet, kion ci frandas ? Iom da lakto, ĉu ?

Li denove iris sur la trotuaron, dum mi malproksimiĝis por ne ĝeni lin. Li rapide langtrinkis. Plurfoje li rigardis min, lekante la lipojn. Ĉu jam malsovaĝigita ?

- Se la loko plaĉas al ci, Matuzet, restu por pli longe konatiĝi. Eble la du « minetz » afable akceptos cin. Ni vidos morgaŭ ...

En la remizo li povos trovi taŭgan lokon por ripozi nokte. Mi supozis, ke li havos bonan opinion de la enloĝantoj. Li revenis sur la trotuaron, kien mi demetis pecetojn da fromaĝo je du metroj de li. Plilongigita miaŭo : li serĉis mian rigardon.

- Jen por ci, Matuzet. Ci povas gustumi.

Li apenaŭ finis la manĝon, kiam patrino Minetz alvenis apud mi, frotante sian kapon kontraŭ miaj kruroj.

- Jes Minetz, estas vizito por ni.

Baldaŭ la du nazoj flaris sin reciproke, kaj Ŝaru sekvis Minetz ĝis la duonfermita pordo. Mi kuraĝe trapasis la sojlon por karesi Ŝaru. Niaj miaŭoj kantis kune. Lasta paŝo kaj mia fingro ektuŝis lian frunton.

- Tio plaĉas al ci, Matuzet, - mi konstatis

Per du kruroj levitaj, li provokis min. Kompreneble mi karesis lin de la frunto dorsen. Ankaŭ li frotis sian kapon kontraŭ miaj kruroj.

Mankis Minetz filino. Ŝi tre ŝatas ripozi en la subtegmento.

Subite distingis mi brunajn makuletojn sur la oranĝkolora felo.

- Ĉu iksodoj gratas cin ?

Joël parolis pri du libroj :

La unua estas libreto kies titolo estas : « Bildstrioj kiel lernolibro ». Verkis ĝin Michel Dechy kiu prezidas la Esperanto-klubon de la urboj Lille-Villeneuve-d'Ascq .Li mem iniciatis kaj zorgis pri la eldono de la esperantigita albumo « Tinĉjo en Tibeto » ĉe Casterman en 2005.

Ĉar li ofte uzis tiun albumon dum Esperanto-kursoj , li havis la ideon konatigi sian metodon por paroligi la gelernantojn pere de la bildstrioj « Tinĉjo en Tibeto ».

La dua ankoraŭ estas bildstrioj . Temas pri « La sekreto de la arbareto de Lascaux ». Ĝi estas traduko de bildrakonto far Thierry Felix – la scenaristo – kaj Philippe Bigotto – la desegnisto - Ĝi temas pri la vera historio de la malkovro de la famkonata groto en 1940.

Tradukis kaj vendas ĝin la Perigorda Esperantista Grupo.

Plurajn ekzemplerojn ni vendis surloke . Tamen restas kelkaj ; la interesotaj mendos al Joël.

Sekve al artikolo aperinte en la lasta LEGI, Monique prezentis BONA ESPERO, duan esperantan libron skribitan de Roman Dobrzynski (lia unua estas “La Zamenhof-strato”). Tiu libro, intervjuoforma, rakontas la historion de tiu brazila fondaĵo, de la komenco en 1957 ĝis nun, kiu protektas, edukas kaj instruas infanojn ne havantajn familion aŭ kiuj spertis mizerajn vivkondiĉojn. Multaj anekdotoj, renkontitaj malfacilaĵoj, fotoj, ebligas facilan legadon.

Post bonvena aperitivo, ni kune partigis niajn alportitajn manĝaĵojn. Post la kafotrinkado, ni akceptis gitariston kiu regalis nin per siaj kantoj, antaŭ ol ni cerbumis pri stranga, petola ŝnureto inter la manoj de Philippe.

Frosta ekstere, sed varma interne estis la etoso de tiu agrabla tago. Dankon al MEG.

Monique kaj Joël

BELA TAGO EN MONTENDRE..

Mi venis en Montendre kun granda plezuro ; unue ĉar mi naskiĝis tie, due ĉar la kultura centro kie ni kunvenis staras en granda kontraŭo kiu, antaŭ 50 jaroj, rolis kiel mezgrada lernejo ; kaj mi lernadis en tiu-ĉi loko ; trie, ĉar la akcepto de niaj ĉarentaj samideanoj ĉiam estas tre afabla.

Monique precize klarigis pri la programo de nia Zamenhof-tago . Mi nur deziras aldoni ke, tagmeze, post altnivela MEGana aperitivo, ni gustumis bonodoran supon.....veran garburon !!.. preparitan de nia amiko Ivano . Mi multe dankas lin, eĉ se li plezure kuiris la garburon ĉar li ŝatas kuiru. En Galgono, ni estas bonŝancaj havi en nia esperantista teamo, tian spertulon !!

Ni deziras al ĉiuj niaj legantoj ... FELIĈAN NOVAN JARON !!!!!

Joel

EL GALGONO !!!

Al ĉiuj geamikoj de Ĉarentio, Ĝirondio kaj al la galgona klubeto.....DANKON !!

Dankon pro la aĉetado, la redaktado, la subskibado de la poŝtkarto de Montendre, kaj, ĉefe, pro la amika intenco kiu kortuŝis nin.

DANKON !!

Jeanne kaj Gaston HERARD

ENKETO

Tiuj, kiuj deziras, aŭ preferas, ricevi LEGI ĉu rete, ĉu papere, bonvolu sendi mesaĝon al Monique :

monique.duss@free.fr

Dankon

JOHANO LA NEAVERTINTO

Kaj li revenis kiel iris for,
Bonfarta sen averti pri la hor',
Ĉe lipo daŭre freŝa bela flor',
En la okulo daŭre arda glor'.

Alina, li tenere kisis vin,
Kaj donis fremdajn ormonerojn kvin,
Maristajn kantojn kantis sen hezit',
Kaj dormis en infana sia lit'.

Kaj li revenis kiel iris for,
Bonfarta sen averti pri la hor',
Ĉe lipo daŭre freŝa bela flor',
En la okulo daŭre arda glor'.

Sonĝadis laŭte pri vojaĝa mar',
Envolvis sin en stranga velkoŝmar'.
Tagiĝe je vekiĝo kvazaŭ rit'
Maristajn kantojn kantis sen hezit'.

Kaj li revenis kiel iris for,
Bonfarta sen averti pri la hor',
Ĉe lipo daŭre freŝa bela flor',
En la okulo daŭre arda glor'.

Bizare li salutis ĉiun, ve !
Kaj iris for samkiel venis re.

Pri Johano, la neavertinto

Delonge mi konas tiun kanton. Delonge mi konas Jakvon. Delonge mi sciis, ke li jam atendas la tradukon de tiu kanto. Ja delonge mi scias, kiel valora ĝi estas por li, de kiam Brassens, lia majstro, senaverte registris tiun kanton lia. Tamen miaj antaŭaj provaĵoj neniam kontentigis min. Plurfoje mi volis sukcesi sed tamen eĉ ne finis la malneton. La celo de tiu nova disko kaj la entuziasmo kunportita de ĉiuj aliaj kontribuantoj al la projekto certe motivis kaj inspiris min. Mi ne povas nei, ke eĉ se mi aparte tute sola redaktis tiun tekston, ĉiuj helpis. Kredu ke ankaŭ por tiu teksto kolektive kontribuis la tuta tradukteamo kaj mi dankas ties membrojn, ke ankaŭ tiu kanto troviĝas sur la disko.

Ĝi fakte estas escepto inter la ceteraj, se ni konsideras, ke nek ties tekston (de Norge), nek ties muzikon (de Jakvo) verkis Brassens mem.

Marcelo Redulez



KANTO por la GARBURUO.....

ĈU VI SCIAS KUIRI LA GARBURON ???

(laŭ la muziko de la franca kanto « Savez-vous planter des choux ! »)

(**unua grupo**) – Ĉu vi scias kuir
La garbur' la garbur'
Ĉu vi scias kuir
La garbur' de tie-ĉi .

(**dua grupo**) – Jes, ni scias kuir
La garbur' la garbur'
Jes, ni scias kuir
La garbur' de tie-ĉi.

(**unu persono krias**): « Ĉu vi longe kuiras ? »

(**la tuta grupo kantas**) – Longtempe ni kuiras
La garbur' la garbur'
Longtempe ni kuiras
La garbur' longe bolas !

(**alia persono krias**) : « Ĉu ĝi bezonas legomojn ? »

(**La tuta grupo kantas**) - Legomojn ĝi bezonas
La garbur' la garbur'
Legomojn ĝi bezonas
La garbur' bonodoras !

(**alia persono krias**) « Ĉu ĝi entenas viandon ? »

(**la tuta grupo kantas**) - Viandon ĝi entenas
La garbur' la garbur'
Viandon ĝi entenas
La garbur' multe gustas !

(**La tuta grupo**) : Se vi deziras manĝi
La garbur' la garbur'
Se vi deziras manĝi
La garbur' de tie-ĉi ,
Tuj sidu por ricevi
La garbur' la garbur'
Tuj sidu por ricevi
La garbur' estas por vi !

La galgonaj kantistoj

Montendre la 19an de Decembro 2010 Zamenhof-tago

LEGADO

Mi deziras paroli al vi pri libro, kiun mi tre ŝatas : ĝia titolo estas : **“Kie boacoj vagadas”**. (*boaco estas norda cervo, remaĉanta mamulo, kiu vivas en arkta regiono*). La libro estas verkita de **Eija Salovaara**, kiu naskiĝis en Finnlando. Ĝi enhavas naŭ novelojn. Ĝi aperis en 1967 kaj en 1994 aperis nova eldono en la serio “originala literaturo”, (pro Esperanto).

La naŭ noveloj havas komunan bazon : en ĉiuj la aventuro okazas en la lando de la noktomeza suno, en Laplando, la lando de la Laponoj, precipe norde de Finnlando, sed ankaŭ norde de Norvegio.... Kaj en preskaŭ ĉiuj rakontoj la aventuro estas travivita de junaj Finnoj, kiuj ekskursas norden. Kelkafoje ne okazas granda evento : ekzemple en la unua novelo **“Nenio frapas sur la pordon”**, temas nur pri tri sufiĉe aŭdeblaj frapetoj sur la pordo de la dormoĉambro de la rakontantino. Sed antaŭ ol iri al la tranoktejo, la junulino longe promenadis ĉirkaŭ la kabano, tute sola en la mallumo, malvarma nokto. La verkistino tiel bone priskribas la etoson, ke ŝajnis al mi, ke mi mem promenas kun ŝi, vidante kun ŝi la strangajn formojn de la arboj kaj de la rokoj, kiuj similas timigajn fantomojn, aŭdante kun ŝi la “majestan silenton” de la noktoKaj, kiam aŭdiĝis tri frapetoj sur la pordo, ankaŭ mi aŭdis ilin, kaj ankaŭ mi ne plu povis spiri. *“Estas vere sorĉa nokto”* skribas la aŭtorino. Certe, jes ! ...

Eija Salovaara havas grandan poezian talenton, kiam ŝi priskribas la laplandajn pejzaĝojn, la senhomajn arbarojn, la senfinajn sovaĝejon, kie nur boacoj vagadas. Ŝi tre bele priskribas la malsamajn kolorojn de la Naturo, laŭ la sezonoj. Precipe, ŝi havas grandan talenton kiam ŝi ebligas nin konatiĝi kun la spiritoj kaj fantomoj, kiuj plenigas tian sovaĝan landon dum la longa senluma vintro....Sed mi timas. Eble, pro mia rakonto, vi pensas, ke en tiu libro oni trovas nur priskribojn. Ne, tute ne ! En aliaj noveloj, oni renkontas humuron, ĝojon, amuzon kaj ankaŭ malfeliĉon...

La lingvo uzata de Eija Salovaara estas tute simpla, klara, facila eĉ por komencantoj.

Do, nur unu konsilon : legu tiun libron ! ...


Christiane J.

Tio okazis en 1991 okaze de SAT-Amikara kongreso en Ambuazo (Amboise -37). Tiam okazis la sep-deka datereveno de la naskiĝo de Georges Brassens kaj ankaŭ la deka de lia forpaso. Tri jarojn poste okaze de kongreso de ESPERANTO-France en Agde, la Kompanoj prezentis sian spektaklon « Vizito ĉe oĉjo Georges » en la Teatro ĉe maro de Seto.

Poste kiel mondcivitano, Jacques Yvart emas kanti en esperanto. Sub impulso de kelkaj amikoj (Flo, Nanne Kalma, Marcelo i.a.) li lanĉas sin kaj kuraĝe alfrontas la defion registri por la Kolekto 2000 kantojn de Brassens en esperanto. Belega sukceso. La diskeldono kvarfoje elĉerpiĝos.

Tio instigas lin finfine (!) registri kantojn de sia Majstro en la franca. Tiel naskiĝas la spektaklo « Mon Brassens à moi, c'est toi... ». Filmita, nun aĉeteblas la DVD-o de tiu spektaklo. Ankaŭ produktiĝas la KD-o, kiu enhavas la ses kantojn unue registritajn en esperanto plus ses novajn titolojn. Tiujn ĉi novajn titolojn tradukis kaprompiĝema teamo (M. Duc Goninaz, R. Cash, B. Legeay, R. Haveman kaj Marcelo). En lasta septembro Jacques Yvart registris ilin en la Vilnilkosmo-studio en Donneville (31).

Kaj nun ni senpacience atendas la novan kompilaĵon « Brassens plu » kaj ĝian prezentadon en Seto la 23an de aprilo.



**ANKAŭ EN ESPERANTO LA KANTOJ DE BRASSENS
BELE SONAS !**

**SE VI DUBAS PRI TIO, EBLE VI NE SPEKTIS LA TEA-
TRAĴOJN DE LA KOMPANOJ,
TIAL NEPRE AŬSKULTU LA INTERPRETADOJN DE
JACQUES YVART.**

Vi verŝajne scias, ke en 2011 pasos la naŭ-deka datereveno de la naskiĝo de Georges Brassens (1921) kaj ankaŭ la trideka de lia forpaso (1981).

Tial ĉie ajn en Francio kaj en la mondo, okazos spektakloj kaj memorprezentaĵoj. Ekzemple en Seto (Sète -34), naskiĝurbo de la poeto, dum la interasocia esperanto-renkontiĝo.

Jacques Yvart kun feliĉo konis « Oĉjon Georges » kaj ĉi lasta amis lin.

Trans la privilegio lin inviti por prezenti siajn unuajn koncertpartojn en la pariza spektaklejo Bobino, Brassens senlime plezurigis Jacques Yvart registrinte kanzonon, kies muzikon komponis Jacques (Jehan l'advenu, Johano la neavertinto, laŭ poemo de Norveĝo).

En sia spektaklo « Mon Brassens à moi, c'est toi... », Jacques Yvart franclingve rakontas kelkajn anekdotojn kaj memoraĵojn, kiuj lin ligas al la « Bona Majstro » kaj kompreneble li kantas kelkajn kantojn.

Tiun spektaklon estas senpage proponita de la urbestro de la vilaĝo Cambes kun partnera agado de ESPERANTO-GIRONDE.

Efektive nevere hazarde tiu spektaklo okazos tie...

Iom pri ĝia genezo :

La Kompanoj, kanta kaj teatra trupo de ESPERANTO-GIRONDE, kiel unuaj en esperanto-medio festis Brassens.

**RENKONTO KUN SANTONANOJ
PRI ESPERANTO**

La 1-an de decembro 2010, la E-o-grupo de Montendre partoprenis en la kutima santona renkontiĝo « Ĉarentia Kvaronhoro », kiu okazis en eta librovendejo « Le Croît vif »(1) en Santono.

La celo estis prezenti Esperanton al homoj, kiuj tute ne konis ĝin, sed bone konis la ĉarentian. Do tio estis la renkontiĝo de la du ekstremaĵoj de la lingvo (aŭ de la lango ?).

Malgraŭ la frosto ĉeestis pli ol dudek homoj, en ege agrabla etoso. Nin tre afable akceptis Pierre Peronneau, iniciatinto de la Ĉarentia Kvaronhoro (propra nepo de la fama Goulebenéze), kaj Paola, la vendejtenistino.

Unue Philippe prezentis kelkajn esperantajn vortojn pere de bildoj kaj gestoj, sen forgesi humuron !

Tuj la ĉeestantoj komprenis, ke substantivo finiĝas per « -o ». Iu eĉ diris : - J'ai tout compris : « galette », c'est « gato », bicyclette, c'est « velo », voiture, c'est « auto » ! Ni ĉiuj lin gratulis !

Poste Janine prezentis la lingvon kaj la kulturon, laŭ la demandoj de la aŭskultantoj. La interŝanĝo estis vere riĉa. Peĉjo Brunaud, ano de la E-o-grupo de Saintes, montris al ni leterojn, kiujn li ricevis dum sia tuta vivo, de korespondantoj el diversaj landoj tra la mondo. Kelkaj datumis je kvardek jaroj aŭ pli. Tio estis tre kortuŝa.

Sekvis entuziasmaj ovacioj post la fablo dirita de Christiane kaj Michel, *La Korvo kaj la vulpo* per du voĉoj, kunigante la du lingvojn, la ĉarentian kaj la esperantan. La ĉeestantoj vigle aplaŭdis.

La sukceso de tiu kunveno permesas al ni esperi, ke tiuj ĉeestantoj estos ambasadoroj por nia kara lingvo !

La MEG-anoj
(MEG estas Montendre Esperanto Grupo)

(1) Le « Croît vif » estas la nomo de regiona eldonejo. Tiu nomo originas de la kresko-profito, kiun akiras la brutaro en la riĉaj herbejoj de Ĉemara Ĉarentio.

MEMORTENENDAJ DATOJ

- **sabaton la 9an de APRILO**, renkonto en la mediateko de **SAINT CIERS SUR GIRONDE**, far Janine Dumoulin

- **sabaton la 16an de APRILO**, koncerto de **JACQUES YVART** akompanata de **FAMO**, en **CAMBES**



- **merkredon la 20an de APRILO**, koncerto de la grupo **KAPRIOLO**, en ankoraŭ nedifinita loko.

Pliaj informoj en venonta LEGI

REMEMORIGO PRI KOTIZOJ

ESPERANTO-GIRONDE	17 €
ESPERANTO-GIRONDE (paro)	23 €
SAT-AMIKARO	35 €

Por la anoj de Sat-amikaro, laŭ ĝia peto, bonvolu aldoni la jenajn informojn :

- - jaro de via naskiĝdato
- - via profesio aŭ via profesio antaŭ emeritiĝo.
- Dankon. La kasistino


Une exposition dédiée à l'espéranto

À partir d'aujourd'hui et ce jusqu'au 18 décembre prochain, se tiendra à la bibliothèque communale, une exposition pour sensibiliser les lecteurs à l'espéranto, la langue universelle.

Temps fort vendredi, avec la dédicace de 17 h 30 à 19 h 30, en présence des auteurs, Thierry Félix et Philippe Bigotto, de la bande dessinée « La sekreto de la arbaro de Lascaux » (soit, Le secret des bois de Lascaux).

Elle a été traduite du français à l'espéranto par le Groupe Espérantiste Périgourdin (GEP). L'espéranto qui existe depuis plus de 120 ans véhicule une idéologie pacifiste. Parlée et étudiée dans plus de 100 pays au monde par plus de 2 millions de personnes, cette langue constitue un lien d'amitié internationale jamais démenti.

Le GEP a tissé un réseau de plusieurs antennes en Dordogne où sont organisés régulièrement des cours animés gratuitement par des espérantistes confirmés. Grâce à des fondements grammaticaux logiques et simples, l'espéranto peut être maîtrisé



La bande dessinée « La sekreto de la arbaro de Lascaux » a été traduite du français à l'espéranto par le Groupe Espérantiste Périgourdin. PHOTO P. M.

plus rapidement que les autres langues et aide à l'apprentissage des langues.

Ces formations, accessibles à tous, sont dispensées à Trélissac, Sarlat, Le Bugue, Mussidan, Bergerac, Le Fleix, Saint-Antoine d'Auberoche,

Beauregard et Bassac et Périgueux et, depuis septembre, à Ribérac.

■ Correspondant DL
Pascale Martin.
Tél : 06 13 15 31 42.
pjmartin24@orange.fr



Santona renkontiĝo (paĝo 7a)

Fotis Michel